**Protokolo de la 33-a Ĝenerala Asembleo** de la Scienca Sektoro de AIS San Marino, okazinta dum SUS 28 en Internacia Universitato Karlovo, 2005-08-27, 16:00–17:00. Ĉeestas: profesoroj Fössmeier, Frank, Poláková, Quednau; pluraj SUS-anoj ĉeestas kiel gastoj.

1. *Formalaĵoj.* La asembleon gvidas la prezidanto OProf. Frank. La ĜA estis laŭorde konvokita kaj do estas kvoruma. Protokolo: Fössmeier (protokolofico). Estas prezentataj kelkaj afiŝitaj proponoj de la senato, traktotaj sub tagordero 3*.

2. *Raportoj.* OProf. Poláková reprezentas la trezoriston, kiu pro tempomanko ne povis prepari buĝeton kaj nur parte faris la finkalkulon pri 2004. Senŝarĝigo ne povas okazi.

   La prezidanto rekomendas, ke la ĜA en eksterorda kunsido decidu pri la financa raporto ĝis tiam prezentota. Ĝis tiam neniu raporto estu prezentita al impostoficejo Paderborn. La ĜA akceptas unuanime.

   La prezidanto raportas, ke AIS por LEŬKAIS certigis la lastan konstruaĵon en la akademidomaro en Komárno inter strato Župná/Megye kaj Eŭropa Korto. En la akademidomaro en somero 2006 okazos TAKIS-kongreso, simpozio memore al OProf. Miloš Lánský kaj SUS 29.

   En Sibiu okazis interkonsento kun la nova ULBS-rektoro Oprean pri nova kontrakto, laŭ kiu LEUKAIS-studentoj, kiuj studas kursojn laŭ aprobita studplano de ULBS kaj ĉe AIS-docentoj, rajtos fini sian studadon per ekzameno ĉe ULBS kaj akiro de rumana diplomo. Tiu kontrakto faciligos la eklaboron de LEUKAIS ankaŭ sen ministeria ekzamenpermeso.

3. *Decido pri afiŝitaj proponoj prezentitaj dum tagordero 1.*

   3.1 La ĜA unuanime akceptas la proponon de la honorofico pri nova honorregularo.

   3.2 La ĜA unuanime decidas ŝanĝi la ekzamenregularon tiel, ke la mimimuma amplekso de kurso estu ne 1,0, sed 0,5 stu.

   3.3 Pri la aliaj regularoj la ĜA unuanime taskas la senaton prepari reformitajn versiojn, pri kiuj decidu eksterorda ĜA en Freising (DE) je sabato, 2006-03-04**.

4. *Ceteraĵoj.* Nenio alia estas pritraktenda.

Karlovo, 2005-08-28
*H. Frank, prezidanto*
*R. Fössmeier, protokolofico*

** La versio publikigita en GrKG/H 46/3 (septembro 2005) erare tekstis „tagordero 6“.*
** La versio publikigita en GrKG/H 46/3 (septembro 2005) erare tekstis „2005-03-04“.*